Eŭropo Demokratio Esperanto

# Protokolo de la ĉefkunveno 2011 de EDE-Eŭropo

La 19an de marto 2011 okazis per skajpo la ĉefkunveno de la federacio Eŭropo Demokratio Esperanto.

El 71 membroj vochdonis 25, tio estas 35%.

## 1 Morala raporto

| Morala raporto | Jes | Ne | Sindetenas |
|---|---|---|---|
| Rezulto (%) | 72 | 8 | 20 |

Morala raporto aprobita.

## 2 Financa raporto

| Financa raporto | Jes | Ne | Sindetenas |
|---|---|---|---|
| Rezulto (%) | 68 | 8 | 24 |

Financa raporto aprobita.

## 3 Aldonaj membroj en la administra konsilio

La rezultoj estas indikitaj en procentoj de la sinesprimintaj voĉoj.

| Kandidato | Jes | Ne | Sindetenas |
|---|---|---|---|
| Renato CORSETTI | 88 | 0 | 12 |
| Guillem GÓMEZ BLANCH | 80 | 4 | 16 |
| Bertrand HUGON | 84 | 8 | 8 |
| Zoltán HUBERT | 84 | 0 | 16 |

Ĉiuj kandidatoj estas enpostenigitaj.

## 4 Nova statuto

| Nova statuto | Aprobas | Ne aprobas | Sindetenas |
|---|---|---|---|
| Rezulto (%) | 68 | 12 | 20 |

La nova statuto ne estas akceptita ĉar la kvorumo (50%) ne estis atingita.

## 5 Komentoj pri la balotoj

Ĝenas, ke la nova statuto ne estis aprobita sed aliflanke la afero estis iom lastminute organizita. Cetere en la statutpropono restas kelkaj punktoj rediskutendaj:

- laŭvorte la artikolo 2a ne ebligas, ke la hungara EDE estu sekcio de la federacio;

- ne iuj kazoj, kiuj foje blokas asocion, estis antaŭviditaj.

La plano do estas la jena:

- aprile rediskuti la enhavon en la administra konsilio kaj kun fakulino;

- maje prezenti la tekston al la membroj;

- junie rete revoĉdonigi la membrojn antau eksterordinara ghenerala kunveno, kiu povus okazi en Wagrowiec.

## 6 Nova estraro

La sep cheestantaj konsilianoj unuanime elektas la jenan estraron:

Bert SCHUMANN : prezidanto, konsilisto pri internaciiĝo kaj retejo

Bertrand HUGON : sekretario

Eŭgen MACKO : vic-prezidanto, konsilisto pri Germanujo kaj orientaj landoj

Guillem GÓMEZ BLANCH, vic-sekretario, politika konsilisto

Zoltán HUBERT : kasisto

La eksprezidanto dankas al sia estraro, chefe al Fabien TSCHUDY, kiu jam multe laboris por la federacio EDE.

La ĉeestantoj gratulas al la nova prezidanto.

Protokolis Bertrand Hugon, serkretario de la federacio EDE.

La 23an de marto 2011

